

EKSTERORDINARA KUNSIDO

La Prezidanto alvokas ĉiujn membrojn de Madrida Esperanto-Liceo por Eksterordinara Kunsido okazonta la lundon 21an de oktobro 2013 je la 19:30 en strato Rodríguez San Pedro 13, 3-7, kun unu sola punkto en la tagordo:

+ Modifi la statuton, ŝanĝante la oficialan sidejon al: Rodríguez San Pedro 13, 3, 28015 Madrid.

El Presidente: Juan del Castillo

NOTO: Antaŭ kelkaj monatoj HEF kompleze proponis al Madrida E-Liceo oficialigi kiel nia "sede social" sian propran sidejon. Por fari tion endas modifi la statuton, precize ĝian unuan artikolon.

Estas bona okazo por tralegi ĝian plenan tekston, serĉe al pliaj modifendaj aspektoj. <http://www.esperanto.es/pli/images/MEL/Estatutos-2005.pdf>

Bonvolu adresi viajn proponojn al la sekretario madrid@esperanto.es, ĝis la 14a de oktobro, kaj la asembleo pritraktos ilin laŭinde.

Profitante la kunvokon de la Ĝenerala Kunsido, la lundon 21an de oktobro ekde la 18:30 ni spektos la filmon "Esperanto", eldonitan de S.A.T. antaŭ du monatoj, kaj reĝisoritan de Dominique Gautier.

NOVA T-ĈEMIZO DE MEL

Madrida Esperanto-Liceo dizajnis kaj vendas novan t-ĉemizon pri Esperanto. La aspekton oni povas vidi en apuda bildo. La nova ĉemizo, el kotono, disponeblas en kvar diversaj grandoj: S, M, L, XL.

Oni povas ĝin aĉeti en la sidejo de MEL, kontraŭ nur 7 eŭroj. Demandu pri rabato pro amasa mendo.

AŬTUNAJ KURSOJ

Juan del Castillo plu instruas Esperanton je du niveloj ĉiun sabaton en la mateno, kun rimarkinda ĉeesto de lernantoj.

La instruado ne plu okazas en Centro Gallego, kiel dum lastaj semajnoj. Ĝi provizore revenis al la HEF-sidejo, sed oni nun serĉas alian lokon, kun pli granda amplekso kaj pli da komforto. Se iu el la madridaj legantoj havas kontakton kun kultura sidejo, kiu povus gastigi la kursojn, bv. kontakti la Liceon.

Dum la lastaj semajnoj de septembro alvenis diversaj proponoj pri kursoj en Madrido. Tiuj el vi kiuj pretos instrui, bv. kontakti la Liceon en la adreso ĉe la fino de nia Bulteno.

Memoru krome ke ni intencas fari specialan penon por informi en lernejoj institucioj. Se vi lernas aŭ instruas aŭ havas aliajn kontaktojn, bv. proponi prelegon aŭ ekspozicion, kaj MEL volonte zorgos pri la detaloj, se necese.

EN "EL PAÍS"

La 30-an de septembro aperis raporto en la paĝoj de teĥnologio de la ĵurnalo El País, pri malmultekosta gastigado, kun ampleksa mencio de Pasporta Servo. Ĝi entenas duonintervjuon al nia samregionano Manolo Pancorbo. La teksto estas legebla rete en:

http://tecnologia.elpais.com/tecnologia/2013/09/30/actualidad/1380531393_853307.html



EN RADIO VALLEKAS

Brila intervjuo 40-minuta al Pedro Sanz kaj Miguel Fernández okazis pasintan 22-an de septembro en Radio Vallekas. Ĝi ĉefe temis pri la ĵusa SAT-Kongreso en Madrido, kaj entenas interalie prezenton de du emociaj poemoj far Miguel. Kvankam la elsendo estas hispanlingva, ili estas verve deklamataj dulingve.

Ĝi troviĝas nun en la Bitoteko de HEF laŭ formato mp3: <http://hdl.handle.net/11013/4261>

RENOVIGO EN LA RETEJO DE HEF

La retpaĝaro de Hispana Esperanto-Federacio spertas dum tiu ĉi periodo rimarkindan renovigon. Post translokigo de servilo komence de somero, al alia kun pli granda amplekso kaj kapablo, en septembro ŝanĝiĝis la baza ŝablono de la retejo. Kvankam la aspekto ne estas tro malsama disde la antaŭa, ĉefa trajto estas ke la nova ŝablono estas pli adaptita al porteblaj telefonoj kaj tabulkomputiloj, kaj pli simpla.

Fine de septembro oni atingis novan mejloŝtonon: la plurlingvigon de la retejo, kiu nun disponas de diversa materialo pri Esperanto kaj la asocio en kataluna, galega kaj eŭska lingvoj.

Dum venontaj semajnoj oni funkciigos internan spacon por membroj de la asocio. Ankaŭ okazos modifoj en la specialaj paĝoj gastigataj en esperanto.es, kiel tiuj de lokaj asocioj kaj de la hispana junula societo. Kompreneble, ankaŭ la paĝoj de Madrida Esperanto-Liceo spertos renovigon. Vizitu <http://www.esperanto.es/MEL> por esplori kiel disvolviĝas la ŝanĝoj.

IBERIAJ ESPERANTO-EVENTOJ AŬTUNE

Diversaj Esperanto-eventoj en la Iberia Duoninsulo aŭ ĉe la pirenea montaro estas anoncigitaj por venonta aŭtuno:

En Mora (Distrito Évora) okazos la 27-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj, de la 4a ĝis 6a de oktobro 2013. Informoj en: <https://www.facebook.com/events/364607373628092/>

En Lloret de Mar (provinco Ĝirono) disvolviĝos la 21-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo 2013, en la Hotelo Gran Hotel Don Juan. La datoj estas de la 5-a ĝis 12-a Oktobro 2013. Pliaj informoj en: <http://personales.ya.com/semajno/>

En Salardú (Valo de Aran) okazos la 36-a Kataluna Kongreso de Esperanto kaj 1-a Okcitana Kongreso de Esperanto, de la 1a ĝis 3a Novembro 2013. Pliaj informoj: <http://esperanto.cat/kongresoj/2013/index.php?llengua=2>.

Krome, amikoj el Francio proponas renkonteton inter hispanaj kaj francaj samideanoj ĉi-aŭtune, en montdometo apud la landlimo, 5 km fore de la intermonto "Col du Pourtalet", la 26an kaj la 27an de oktobro. Kontakto MEL se vin interesas la iniciato.

VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º.

La babilrondo oktobra ne okazos... ĉar ĝi jam okazis en la lasta semajnfino de septembro. Pedro Hernández kunvokis tiun tagon por prezenti sian fianĉinon, Balogi, el Bocvano.

Probable oni kunvokos alian kunvenon por la monato oktobro. Atentu novaĵojn en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/ kaj ankaŭ en la retejo de MEL: <http://www.esperanto.es/mel>.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

